

Philippe Suchard (3) fondinto de ĉokolad-fabriko, la krea periodo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-848/339, 1980 januaro 10 kaj 12
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-51/SRI-1980-51-B-6-339-848-1980-01-10-12-2a-en-80-Claude-kaj-Andree-Gacond-Philippe-Suchard-3-fondinto-de-ĉokolad-fabriko-La-krea-periodo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Trian elsendon ni dediĉas al la interesa vivo de Philippe Suchard, la fondinto de la ĉokolad-fabriko Suchard. Antaŭ ol instaligi en Neuchâtel por fondi sukeraĵojn, kaj unu jaron poste ĉokolad-fabrikon en la najbara vilaĝo Serrière, Philippe Suchard faris sesmonatan vojaĝon tra Usono.

A.- Philippe Suchard konservis de tiu ĉi vojaĝo vizion pri la malfeliĉa sorto de svisaj elmigrintoj, kiuj alvenis sen preparo kaj sen vivrimedo sur la amerika tero, kaj tie plej ofte pereis aŭ vegetis en neimagebla mizero. Iom post iom Philippe Suchard alvenis al la ideo, ke estus utile krei specon de helpa kolonio, kie la elmigrantoj povus provizore aŭ eĉ definitive instaligi je sia alveno en Usono. Tial en 1842, tiam li estis 45-jara, Philippe Suchard reveturis al Usono en la celo akiri la necesan teritorion. Li interesiĝis je regiono en la ŝtato de Nov-Jorko, kiun siatempe Joseph-Bonaparte, la frato de Napoleono la unua, estis akirinta. Ĝi vastis dudekmil hektarojn kaj situis inter la rivero Saint-Laurent kaj la urbo Utica. Antaŭ ol reveni eŭropon por fondi akcian societeton profite al la kolonio sub la nomo "Alpina", li elektis surlokan helpanton. Bedaŭrinde la kunlaboranto, kiu nomiĝis Lafarge, montriĝis nerealisma, kio ruinigis la tutan projekton en senprofitaj investadoj celantaj produkti feron.

Cl.- La akcia societo "Alpina" havis kiel celon konstruigi en la aĉetita kolonio lignodomojn, kiujn la elmigrintoj povus unue lu-ricevi preskaŭ senpage kaj poste aĉeti je ege modera prezo, se ili intencus definitive instaligi tie. Bedaŭrinde por Philippe Suchard kaj la akciuoj, kiujn li kapablis konvinki, la jaroj 1842-1848 korespondis al regresa periodo en la elmigrado usonen kaj fine eĉ al socie tumultaj jaro. Tial la societo post kvino da jaroj estis malfondita. La akciuoj deklaris, ke Philippe Suchard neniel respondecis pri la fiasko de la kolonio Alpina. Sed tiu ĉi malsukceso, kiu ne estis la sola, konvinkis Philippe Suchard forlasi la kreemon de novaj entreprenoj, favore al tiu, kiu plej bone fartis, tio estas la ĉokolad-fabriko en Serrière.

A.- Ni diru kelkajn vortojn pri la multaj kreaĵoj de Philippe Suchard. Ni jam raportis pri la vaporŝipa societo de la lago Neuchâtel kaj pri la vaporŝipo "Industriulo", kiun Philippe Suchard mem stiradis dum dekkvar jaroj. Sed la lagoj de Neuchâtel, Murten kaj Biel ne kontentigis lin. Unu jaron post la kreo de la neŭŝatela vaporŝipa societo, li partoprenis la kreon de sama societo por la lago Thun, prizorgante la mendon de vaporŝipo, ankaŭ ĉe la pariza inĝeniero François Cavé. Tiu ĉi ŝipo ricevis la nomon "Bela Vido" kaj ekveturis la 31-an de julio 1835. Philippe Suchard sur sia vaporŝipo "La Industriulo" formis stirantojn kiuj poste dungigis kiel kapitanoj de la novaj vaporŝipoj, kiuj komencis navigi sur la svisaj lagoj.

Cl.- Sed ankaŭ ekzistis riveroj. Philippe Suchard en sia unua vojaĝo en Usono konvinkiĝis pri la utileco de la rivera navigado. Tial en 1840 li okupiĝis en Bazelo pri la kreo de vaporŝipa kompanio, kiu ricevis la nomon "Agloj de Alta Rejno". En junio 1840 alvenis en Bazelo la unua vaporŝipo, kiun oni baptis "La Aglo Numero Unu". 200 personojn ĝi agrable transportis inter Bazelo kaj Strasburgo en ses da horoj. Revene ĝi bezonis dek ses horojn por reatingi Bazelon. Eleganta restoracio igis tiun vojaĝon tre komforta. La afero montriĝis promesplena.

A.- Tial du novajn ŝipojn oni mendis al la pariza inĝeniero François Cavé, sed kun "La Aglo Numero Du" komenciĝis la malfacilaĵoj. Jam dum la transporto de Parizo al Rotterdamo okazis la unua katastrofo. Uragano kaŭzis tiomajn difektojn, ke oni devis ripari la vaporŝipon en Dovro. Kaj poste en Majenco rompiĝis la havenaj fikskabloj, kaj la ŝipo sengvide eliris, detruante muelejojn kaj sin mem. Estis vera katastrofo, kiu kaŭzis la ruinon de la tuta entrepreno. Nur sesdek jarojn poste renaskiĝos la vaporŝipa navigado sur la alta parto de la rivero Rejno. La entrepreno, al kiu kunlaboris Philippe Suchard, estis antaŭtempa.

Cl.- La observo de la variadoj de la nivelo de la lagoj Neuchâtel, Murten kaj Biel, konvinkis Philippe Suchard, ke per la konstruo de bone lokitaj baraĵoj, per la profundigo de la ekzistantaj riveroj kaj eĉ per la konstruo de rivertunelo kaj de kanaloj, oni povus reguligi la nivelon de la akvo kaj komfortigi ne nur la navigadon, sed ankaŭ la vivon mem sur la lag-bordoj. Philippe Suchard subvenciis studojn kaj la unuajn riverprofundigojn kaj mem verkis projektojn, kiuj ne restis seneĥaj.

A.- Ĉiam dum la sama periodo Philippe Suchard interesiĝis pri la bredado de silko-raŭpoj. Li konvinkiĝis, ke la neŭŝatela klimato konvenis al tiu industrio, li plantigis trimil morusarbojn en la vitejoj de Serrière kaj li venigis raŭp-brediston el Avinjono por direkti la silk-raŭpejon. Apud la ĉokolad-mueliloj Philippe Suchard instaligis maŝinojn por ŝpini kaj teksu la kokonsilkon. Ĉio glate disvolviĝis, kaj la 13-an de majo 1844 Philippe Suchard povis sendi al la registaro de la princlando Neuchâtel la unuan silkan fulardon, kiun oni produktis en Serrière. La prusa reĝo, al kiu tiu silkaĵo estis transdonita, sendis komence de 1846 kuraĝigan premion de mil pundoj. Tiam la silkraŭpejo de Suchard estis la plej granda de tuta Svislando. Subita epidemio veninta el Sudfrancio mortigis en kelkaj tagoj ĉiujn raŭpojn. Ruiniĝis granda espero, kiu kaŭzis, ke en Serrière ankoraŭ hodiaŭ kreskas morusarboj.

Cl.- Por doni ideon pri la tumulto entreprenemo de Philippe Suchard ni ankoraŭ diru kelkajn vortojn pri la asfalta minejo de "Val-de-Travers". Ĉirkaŭ 1842 li provis doni dinamismon al tiu minejo. Tiucele li asfaltigis la tegmenton de sia ĉokolad-fabriko kaj same demonstre kovris de asfalto promenvojojn en la ĉirkaŭaĵoj. Mendoj venis el germanaj urboj kiel Karlsruhe, Mannheim, Heidelberg kaj München por asfaltigi trotuarojn. Bedaŭrinde la perreklamaj vendoj havis nur efemeran sukceson kaj en 1849 la societon oni devis likvidi. Ankaŭ antaŭtempa estis la entrepreno.

A.- Ekde tiam Philippe Suchard dediĉis sian komercistan energion nur al la reklamado de sia ĉokolado, rezignante pri la fabrikado de aliaj produktoj, ekzemple de pastaĵoj. Lia reklama metodo, kiu estis avangarda tiel bone sukcesis, ke rapide kreskis la entrepreno.

Cl.- Tre plenan vivon havis la ŝipkapitano Philippe Suchard. Frumatene li vizitis siajn du entreprenojn en Neuchâtel kaj Serrière, kaj poste li stiris sian ŝipon ĉu al Yverdon, ĉu al Bielo. Post la reveno li okupiĝis pri la librotenado kaj pri aliaj taskoj. Sed tio ne sufiĉis al li, kiel ni vidos la venontan semajnon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond rakontis pri la neordinara vivo de Philippe Suchard. Ĝis reaŭdo!